



## La 22-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO SALOU 4 -11. 10. 2014



Komence de oktobro la urbo Salou situanta proksime de Tarragono en Hispanio gastigis la kvaran fojon Internacian E-Semajnon. Jam de kelkaj jaroj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superas 140. Ĉi-foje ili venis el dekdu landoj. Alloga loko ĉe la maro altiras geesperantistojn por komuna unusemajna restado en bona etoso. Multaj jam konas unu la alian, sed ĉiam aperas novuloj, kiuj bone integriĝas al la grupo de fideluloj. La plej aĝaj estis la geedza paro el Katalunio: Trini García 97-jaraĝa kaj Joseph Colom baldaŭ



100-jaraĝa! Al ili estis ĉi-jare aljuĝita la premio "Ada Sikorska Fighiera" pro ilia meritplena laboro por Esperanto.



En la solena inaŭguro ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Salou s-ro Pere Granados Carillo. Li prezentis al ni la urbon el la vidpunkto de turismo, subtekis gravecon de Esperanto kaj deziris al ni sukcesplenan restadon kaj fruktodonan laboron. Poste okazis komuna fotado.



Dum la Semajno okazis E-kursoj. Progresantojn gvidis la sperta instruantino Rodica Todor el Rumanio. Ĉi-foje ŝi proponis tre interesan temon: "Esperanto-Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio". Ŝi klarigis FLAM-analizon, laŭ kiu ni poste en grupoj diskutis kaj faris konkludojn. FLAM temas pri: Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj. Pluraj partoprenantoj en tiuj diskutoj rakontis pri siaj spertoj rilate la instruadon, redaktadon de lokaj bultenoj aŭ organizadon de diversaj aranĝoj kaj staĝoj. Ili dividis siajn sciojn kaj spertojn kun aliaj.

Pri komencantoj okupiĝis Thierry Saladin. Li ankaŭ prezentis prelegon kaj klarigis pri la internacia peticio titolita "Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio Tuj!" iniciata de 16-jaraĝa junulo en februaro 2013. La deziro estas akcepti Esperanton TUJ! Tiucele estis fabrikitaj T-ĉemizoj, kiujn Thierry vendadis dum la aranĝo.

Gian Carlo Fighiera regalis nin per la verko de Alexander Puŝkin "La Neĝŝtormo" kaj "La Damo de Piko". Fine ni ĝuis la novelon "Palto" de Nikolaj Gogol.

Floreal Gabalda projekciis filmon el Nepalo pri la "Speciala Renkontiĝo", okazinta tie ĉi-jare komence de marto. Ni partoprenis en ĝi. Multaj aprezis la filmon kaj demandoj pri niaj spertoj ne mankis.



Soi Fanta



Marcel Delforge parolis pri siaj vivspertoj kaj rakontis pri kelkaj el siaj multnombraj vojaĝoj en Esperantio ilustrante ilin per kelkaj bildoj.

Rafaela Urueña prezentis sian libron "Eŭropo paŝon post paŝo" el jura vidpunkto. Intereso pri kelkaj ekzempleroj kiujn ŝi kunportis estis granda kaj la stoko rapide elĉerpiĝis.

János Petik prezentis la temon "La disvastigo de Esperanto", sed antaŭe li parolis pri kelkaj gramatikaĵoj.

Vesperaj programeroj inkluzivis du interkonatiĝojn. Maria Ferigle Danti prezentis per DVD operon "IL TROVATORE". Ŝia edzo Luis Serrano Pérez animis du vesperajn debatojn: "Kiun influon havas nia movado en la socio?" kaj "Ĉu la Semajno bone funkcias?". Oni povas diri, ke "jes" malgraŭ kelkaj malglataĵoj. Luis ĉefe okupiĝis pri libroservo. Je dispono de la partoprenantoj estis ankaŭ fotoalbumoj. La ĉeestantoj povis trarigardi ilin kaj ekmemori antaŭajn E-Semajnojn kaj aliajn E-eventojn. Unu el la plej atendataj kaj ŝatataj eventoj estas la folkloro vespero kun la ensemblo *Montjuic*, kiu ĉiam regalis nin per belaj havanaj kantoj instigaj al dancado. Tiukaze ne mankas *Cremat*-bongusta trinkaĵo el bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj.



Okazis unu tuttaga kaj du duontagaj ekskuroj. Pri la gvidado zorgis Rosa López kaj Antonio Martínez. Ni vizitis groton de Maravelles. Kuriozaĵo en tiu groto estas, ke el la plafono pendas kelkaj kalkaj formaĵoj kreskantaj ĉiudirekten. Partoprenantoj de la alia duontaga ekskurso vizitis la urbon Tarragono. Kelkaj profitis belan veteron por refreŝiĝo en la hotela naĝejo aŭ en la maro, aliaj promenis tra la urbo Salou, iuj vizitis la amuzparkon "Bona Aventura". Grupeto de piedirantoj promenis ĝis novkonstruita lumturo situanta ne tro malproksime de la *Cap Best Hotel*, en kiu ni loĝis. Survoje al ĝi Antoni Comellas atentigis nin pri kelkaj botanikaj plantoj kaj kompetente informis pri ili. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Amposta, kie ni enŝipiĝis kaj navigis sur la rivero Ebro ĝis la maro.

Koran dankon al la katalunaj samideanoj pro ilia fervora laboro kaj okazigo de tiu-ĉi plaĉa aŭtuna evento al kiu ni jam sopiras venontjare.

Liba Gabalda



Fotaj de Andreo

**36a BAVELO-Seminario****76a regiona staĝo de**

**Okazis en Germanio de la 17a ĝis 19a de oktobro 2014  
Domo Maria Lindenberg, Sankt Peter**

**esperanto**  
*France-Est*

Tiu aŭtuna staĝo de Esperanto-France-Est kaj seminario de Bavelo okazis ĉi-oktobre sur la Nigra Arbaro apud la ubo Sankt-Peter sur monto en tre komforta domo Maria Lindenberg en vere agrablaj malfru-someraj tagoj . Raportas pri ĝi Jocelyne Monneret kaj Ginette Martin. Ni ĝuu iliajn travivaĵojn.



*Eble rakonto pri mia vojaĝo interesus vin, mi deziras noti, ke Ursula atendis min ĉe la staci-domo de Frajburgo je la 12a21 kaj ke, pro ŝtopiĝo sur la ponto inter Francujo kaj Germanujo, mia buso malfruis en la staci-domo de Breisach, kaj la celata trajno jam foriris. Feliĉe, la sekva trajno venis nur duonon de horo poste, kaj mi povis telefoni al Ursula, por ke ŝi atendu min pli longe.*



Ĝi okazis en „Domo Maria Lindenberg“, domo kiu estas haltejo por pilgrimantoj, en vilago ST Peter apud Frajburgo (Germanio).

En tiu loko estas preĝejo dediĉita al meditado. Silento premas ĉiujn por ripozi aŭ kaj mediti. La monto “Lindenberg” estas inter la grandaj fortlokoj en Nigra Arbaro, kies plej alta pinto estas Feldberg videbla ekde” Domo Maria Lindenberg”.

*La vendreda posttagmezo esti dediĉita al vizito al la muzeo de kukolo-horloĝoj, en Sankt Märgen, 8 km for de Sankt-Peter. Tiu muzeo estas tre bone zorgita. Oni povas sekvi la evoluon de tiuj horloĝoj, kiuj estis komence tre primitivaj kun unu sola hor-montrilo kaj estis faritaj nur el ligno, ĝis la plej evoluigitaj, kiuj povis aŭdigi kukolo-kantojn sed ankaŭ mekanikan muzikon. Ni ĝuis la klarigojn de la gvidanto, la tradukojn de Ursula, kaj la aŭdadon de diversaj muziketoj kaj ni ankaŭ vidis moviĝantajn statuetojn en iuj horloĝoj ; oni komprenas, ke la plej belaj estis famaj kaj venditaj tra la mondo, kaj la vojaĝ-vendistoj devis zorgi pri tre valoraj varoj,*



Vespere, post kursoj aŭ spektado de bildaroj, amuza ludo pri arboj kaj plantoj ebligis interkonatiĝi.



*Post la vespera manĝo, kiu okazis laŭ libera preno de prezentiataj varmaj kaj malvarmaj manĝoj, ni havis kelkajn momentojn de diversnivelaĵoj kursoj aŭ projekciado de antaŭaj esperanto-aranĝoj, kaj poste komuna ludo por ĉiuj. Ni devis diveni, kiu ni estas; bileto kun nomo de besto aŭ planto esti pinglita sur nia dorso kaj ni devis enketi por trovi, kiu ni estas. Poste, kiu volis ankoraŭ babilu havis eblon ĉe la knajpo.*

Sabate matene du prelegojn ni aŭskultis: Unue pri mondmilito kaj esperantistoj fare de Eduardo Borsboom,

Due pastro Bernard Eichkorn parolis pri pastro Max Josef Metzger, kiu iĝis pacbatalanto pro la milito.



Dume komencantoj daŭre lernis la lingvon.

Posttagmeze estis elektota ekskurso al lago Titisee aŭ piedirado al Sankt-Peter, kie ni admiris tre faman preĝejon de monaĥejo laŭ rokoko/ barok-stilo; pro leĝo pri gvidantoj, nur germanaj parolantoj povis viziti la bibliotekon (aliaj ne komprenis!)

Ni ĵus revenis por aŭskulti en la preĝejo de Lindenberg belegan koncerton de citroensemblo:



Mi citas la plej gravan de ĉiu aŭtoro :  
 Baghi, "La verda koro"  
 Ŝirjaev "Sen titolo"  
 Raymond Ŝvarc "Kiel akvo del' rivero"  
 John Francis "La granda kaldrono"  
 Teodor Ŝvarc "Modernaj robinsoj"

belsonaj melodioj klasikaj kaj ĵazaj!

Post prezentado de legindaj libroj pere de Jean-Luc Thibias, Christoph Frank-mi nomas lin "la Germana Jomo"-vigle kantis kaj kantigis nin dum la vespero, ludante pere de diversaj muzilkiloj: gitaroj kaj mandolino.

*Sabate matene, ni havis prelegon de Ed Borsboom "*

*Kion faris esperantistoj dum la unua mondmilito ? "*

*Temis unue pri konkreta ago, la helpo en transsendo de leteroj de militkaptitoj, kiuj transiris tra Svislando ĉe UEA; ĉirkaŭ 300 da ili iris de francaj militkaptitejoj al siaj familioj kaj inverse.*

*Dua temo: Ĉu esperantistoj verkis dum la milito? Jes, kelkaj, ekzemple Hyams, kiu verkis "Nova sento" pri ideala mondo; li certe deziris forgesi la aktualan.*

*Oni povas noti la agojn de Julio Baghi, militkaptito en Siberio, kiu instruis Esperanton al diversaj militkaptitoj el 20 nacioj kaj ankaŭ al vilaĝanoj, ĉar li estis relative libera, tamen sen ebleco fuĝi.*

*Kaj post la milito? Notindas 5 aŭtoroj, kiuj verkis post la milito librojn pri la milito, kaj la komuna trajto por ĉiuj estas objektiveco.*





Dimanĉe matene Edmond Ludwig, entuziasme, vige kaj precize laŭdis la faman romanon de Raymond Schwartz „Kiel akvo de l'rivero “kaj historie rakontis pri la vivo en sia alzaca vilaĝo Stosswehr, kiu estis detruita dum la Unua Mondmilito.

Li montris vojon jam faritan – eĉ se longdaŭranal pli da interkompreniĝo inter Francio kaj Germanio, inter kiuj Alzaco kulture kaj lingve ekvilibras. Li ankaŭ laŭte revis pri adopto de Esperanto, kiu



ebligus rektan interkompreniĝon kaj pli rapidan scipovon de ambaŭ najbaraj lingvoj.

Post la tagmanĝo estis jam tempo por disiĝo. Ĉiuj kunportis belan memoraĵon pri tiu renkontiĝo.

Jocelyne MONNERET

Poste, Bernhard Eichkorn prelegis pri katolika pastro Max Josef Metzger, kiu estis armea pastro en la komenco de la unua mondmilito en 1914, iĝis pacemulo, poste dum sia tuta vivo subtenis la ideon de paco. Dum la dua mondmilito, en 1944, li estis murdita de la nazioj. Oni taksas lin "martirulo de paco". Pro tio, li meritas esti kano-nizata. Aliflanke, li estis esperantisto, eĉ eldonis religian ĵurnaleton

en esperanto. Ni ricevis fotokopion de tiu ĵurnaleto. Mi rimarkis, ke kelkaj reklamoj aperis sur tiu ĵurnaleto, inkluzive unu por cigaroj.

Post la tagmanĝo ni povis elekti promeni piede ĝis la vilaĝo aŭ iri aŭtomobile kaj viziti la bibliotekon, aŭ veturi ĝis Titise kaj ŝipi sur la lago.

Je la 17a, ni havis koncerton de gitar-orkestro en la preĝejo de nia gastejo. La koncerto estis vere altnivela, tre varia kaj ege plaĉa.

Post la vespermanĝo (mi notas, ke la vesper-manĝoj komenciĝis je la 18a horo), okazis kursoj de esperanto aŭ ĉeesto ĉe la prezento de novaj libroj fare de Jean-Luc Thibias.

Poste, ĉiuj kunvenis en la granda salono, kaj Christof Frank kantis kaj kantigis nin.

Pri la dimanĉa mateno-programo : Edmond Ludwig prelegis pri "Kiel akvo del' rivero" kaj poste pri la temo "Kiel alzaca vilaĝo disŝiriĝis pro la milito" Ambaŭ prelegoj estis ege interesaj, la dua parto ĉefe emoci-veka pro la fakto ke Edmond vivis tiun disŝiron tra sia persona familio.

Post la tagmanĝo, venis la adiaŭmomentoj.

Notindas, ke ĉeestis 51 personoj, inter kiuj junaj paroj kun beboj, kiuj donis junan etoson al la renkonto.

Mi bedaŭras, ke ne sufiĉe da francoj ĉeestis, ili perdis okazon ĉeesti aranĝon, en kiu ĉio estis pozitiva kaj entuziasmiga: suno, gastejo, etoso, kursoj kaj prelegoj.

Ginette MARTIN



Karaj gesamideanoj,



Jam finiĝis la bela sezono de la kongresoj kaj de la plej diversaj esperantistaj aranĝoj tra la mondo. Mi esperas, ke vi ĝuis la internacian etoson, kiu tiom ĝojigas nin, la fervorajn samideanojn. Tre certe vi denove eklaboris por la disvastigo de nia kara lingvo. Ni esperu, ke dum la diversaj agadoj ĉe budoj vi sukcesis logi novajn gelernantojn al viaj kursoj.

Nia helpsekretario, Catherine Kremer, decidis organizi la kongreson de SAT-AMIKARO en Verdun venontan Paskon. Ni do proponos ielan aliĝon al tiu aranĝo anstataŭe por nia kutima printempa staĝo. Tre certe tio ebligas partoprenon en ege riĉa kultura programo.

Tre verŝajne interesan kulturalan programon vi ankaŭ povos ĝui dum la Majo de Eŭropo, kiun jam aktive preparas la grupo de Nancy kunlabore kun la urbaj instancoj.

Kaj en Oktobro tre verŝajne okazos en Mulhouse la unua "Tago de Esperanto" organizata de Roberto Kueny kun la helpo de Jacques Pineda kunlabore kun la asocio de la mondciĉvitoj.

Pri ĉiuj tiuj aranĝoj ni pli detale vin informos en la venontaj numeroj de LA INFORMILO. Ne forgesu ĝin reaboni kaj abonigi viajn geamikojn.

Edmond LUDWIG

**Deuxième festival de l'Association Euro-Afrika-Solidareco**

C'était bien dommage que l'intervenant principal qui devait parler des problèmes linguistiques en Afrique ne soit pas venu et que le public n'ait pas dépassé les dix personnes, mais ce deuxième festival organisé à Colmar par Monsieur Fernando NKANU et dont le programme avait été diffusé dans les Dernières Nouvelles d'Alsace ne fut tout de même pas un échec.

Il a eu lieu dans le splendide auditorium de la Médiathèque, le samedi 11 octobre 2014. L'importante manifestation à Strasbourg contre la super-région Alsace-Lorraine-Champagne à laquelle avaient été invitée la population alsacienne (environ 15000 personnes) avait visiblement pris les organisateurs de court. L'une des craintes des alsaciens concernait bien sûr également le sort de leur langue.

Cette rencontre fut tout de même une réussite grâce au mot d'introduction détaillé et très pertinent de Monsieur Fernando NKANU. Suivit l'intervention convaincante de Monsieur Jacques PINEDA qui prit la parole au nom des Citoyens du Monde. Monsieur Edmond LUDWIG (Espéranto France-Est) présenta la Langue Internationale ESPERANTO et les solutions qu'apporterait la reconnaissance officielle de cette langue auxiliaire. Une traduction d'une fable de LA FONTAINE en espéranto fut déclamée par Monsieur Robert KUENY qui fut applaudi par l'assistance. Monsieur KUENY a également parlé de ses voyages à travers la Scandinavie et en Afrique grâce au service d'hébergement PASPORTA SERVO de l'association internationale des jeunes espérantophones (TEJO). Il avait notamment visité le collège ZAMENHOF au TOGO où tous les élèves apprennent l'espéranto. Suivirent de nombreuses questions des participants.

Après une pause-café et gâteaux (offerts par des bénévoles de l'association organisatrice), quatre participants africains présentèrent un sketch expliquant les difficultés d'intégration liées aux problèmes de compréhension de la langue dans le pays d'accueil.

Ont participé les associations suivantes : CIMADE (Comité Inter Mouvements auprès des Evacués), ACO (Action Catholique Ouvrière) kaj KEPHAS – Foyers Saint Joseph de Père Etienne en Guinée, Espéranto France-est, Les Citoyens du Monde.

Forpasis la 28-an de Novembro 2014 je la aĝo de 90 jaroj sinjorino Camille DENIS, edzino de nia longjara kunlaborinto kaj amiko Pol DENIS. La tuta estraro de Espéranto France-Est kondolencas al la familio.

**BAR-LE-DUC - VANDŬEVRE-LÈS-NANCY  
NANCY - BAD SÄCKINGEN (ALLEMAGNE)  
METZ - THIONVILLE - LAXOU - LUDRES**

Diana ANDRÉ et Guy ;  
Bertrand DENIS et Sabine ;  
Isabelle DENIS,  
ses enfants ;  
Séverine, née ANDRÉ et Samuel KLIPFEL ;  
Estelle, née DENIS et Sylvain HOUY ;  
Dorothee ANDRÉ ;  
Xavier DENIS et Marie-Christine HAAS ;  
Anne-Claire DENIS et Ioan BERNEVIG,  
ses petits-enfants ;  
Justine, Emma, Kevin, Mael, Oxane, ses arrière-petits-enfants ;  
Renée BRABANT, sa sœur ;  
Véronique TAVERNIER, sa nièce, et Guy ;  
Et toute la parenté  
ont la tristesse de vous faire part du décès de

**Madame Camille DENIS**

née PAESCHEN  
Institutrice retraitée de l'école de la République  
survenu à Bar-le-Duc, le 28 novembre 2014, dans sa quatre-vingt-dixième année.  
Selon sa volonté, les obsèques ont eu lieu dans la plus stricte intimité familiale.

Une pensée est demandée pour son époux,

**Pol**

décédé le 21 novembre 2013.

Cet avis tient lieu de faire-part et de remerciements.  
PFG AGRAPART, 1 bis, rue de Verdun, 55000 Bar-le-Duc,  
hab. 14.55.04. tél. 03.29.79.01.25.

**SOLVOJ de la problemo en la 167a "Informilo"**

**Proverbo 167:**

MALGRANDA PEZO, SED GRANDA PREZO


**KVE 167 : SOLVO**

**Horizontale:** 1.KANALIGAD 2.OKA. UNIKA 3.MATEMATIK 4.APATI. ART 5.NAL. NUR 6.DRIVE. OBL 7.TASO. LA 8.NŬALK. MUR 9.TATSA. KAB

**Vertikale:** 1.KOMANDANT 2.AKAPAR. ŬA 3.NATALITAT 4.ET. VALS 5.LUMINESKA 6.INA 7.GITARO. MK 8.AKIR. BLUA 9.DAKTILARB

Litersudoko 167 >>:

E	T	V	I	L	O	A	F	S
O	F	L	V	A	S	T	I	E
I	A	S	F	E	T	O	L	V
V	S	I	E	O	A	F	T	L
F	E	A	L	T	I	V	S	O
T	L	O	S	V	F	E	A	I
A	I	T	O	S	E	L	V	F
S	V	E	T	F	L	I	O	A
L	O	F	A	I	V	S	E	T

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asseseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ino Catherine KREMER	03.87.01.00.39	catherine2.kremer@laposte.net
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

<b>Abono al La Informilo</b> →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Bruno Henry	13. Nova urbo - lasta kiso
2. Semajno en Salou	14. Staĝo en Verdun
3. Semajno en Salou	15. Albana pola kunlaboro
4. Raporto Staĝo en St-Peter	16. La Informilo 1955
5. Raporto Staĝo en St-Peter	17. Abonoj kaj kotizoj
6. Raporto Staĝo en St-Peter	18. Nos cotisations 2015
7. Angulo de la prezidanto	19. Libertempo - solidareco
8. Komitatanoj kaj menuo	20. Stano Marček - IFEF 2015
9. Libro-servo	21. Aktivajoj Thionville
10. Libro-servo	22. Vojaĝo tra Ĉinio
11. Diskriminacio de la lingvoj	23. Vojaĝo tra Ĉinio
12. Libro Gublinks - La bato	24. Vojaĝo tra Ĉinio

<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Esperanto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>
---





# El nia libroservo



## Informoj

⇒ Multaj novaj libroj alvenis, ĉi foje ĉefe el oriento. Legu kaj ĝoju, kaj ne hezitu sendi viajn komentojn por la venonta libroserva paĝo.

⇒ La libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon, kiu okazos samtempe kiel la kongreso de Sat Amikaro en Verdun dum aprilo 2015.

Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias



## Novaj libroj senditaj de Tomasz Chmielik:

1



2



3



1. **Vizio de juna virino**, romaneto, **Edmond Privat**, *Świdnik*, 2014, 50 paĝoj. **7, 00 €**. "Tiu vizio de juna virino estas nenio alia ol propra prezento de tio, kion la aŭtoro opinias la signfo de la vivo" (Eric Descoedres).
2. **Revenoj al Krynki**, diversaĵoj, **Sokrat Janowicz**, *Świdnik*, 2014, 216 paĝoj. **15, 00 €**. Prozaĵoj de fama belorusa verkisto, loĝanto de Krynki, urbeto nun situata en Pollando. Krynki apartenis al diversaj ŝtatoj dum la 20a jarcento (Rusio, Pollando, Germanio kaj denove Pollando), ĝia loĝantaro ankaŭ multe evoluis. Kaj la vivo de la verkisto ne ĉiam estis facila!
3. **La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj**, Diversaĵoj, **Eqrem Basha**, *Świdnik*, 2014, 76p, **9, 00 €**. Komento de la eldonisto pri la verkisto: "li estis unu el la plej gravaj kosovaj verkistoj. En sia poezio, li serĉas lingvaĵon por esprimi propran ribelemon kaj engaĝiĝon en la aferojn de la mondo laŭ Camus-a maniero." □

## Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon
  - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉidorsan mendilon)
  - per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
  - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.  
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO" **IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97  
**BIC** : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.



## Nenovaĵoj ĵus alvenintaj:



- 1 **Urbo Goblinsk**, Romano, **Mikaelo Bronŝtein**, *Impeto*, 2010, 306 p, 18 €. Postsovetaj travivaĵoj.
2. **El ombro**, Antologio, Arosev/Gudskov, *Impeto*, 2008, 100 p, 7,50 €. Tre diversaj prozaĵoj de nuntempaj rusaj esperantistoj.
3. **Mara stelo**, Novelaro, **Julian Modest**, *Impeto*, 2013, 112 p. 9,90 €. De fama bulgara esperantisto, iam vivinte en Hungario.
4. **Hunda koro**, Novelo, **Mihail Bulgakov**, *Impeto*, 2012, 184 p, 14 €. Novelego verkita en Moskvo en 1925.
5. **Eringio-Herbo vagabonda**, Memoraĵoj, **Mirina Vlasova**, *Impeto*, 2006, 280 p. 15 €. Memoraĵoj de rusino longtempe loĝinte eksterlande kaj fama pro prezentado dum jardekoj de vespera teatraĵo por infanoj en Rusio.
6. **Vastaj emocioj kaj ne perfektaj pensoj**, Romano **Rubem Fonseca**, *Impeto*, 2010, 304 p, 18 €. El fama brazila verkisto.
7. **Knabo kaj mallumo** Romano, **Sergej Lukjanenko**, *Impeto*, 2011, 256 p, 18 €. Elluma katido alvenas en ĉambron de malsana knabo kaj gvidos lin en eksterordinaran aventuron...



## Sciencfikcio - Nembraĵoj



8. **Invado: Tero**, Sciencfikcio, **Harry Harrison**, *Impeto*, 2012, 160 p. 12, 50 €. "sciencficia romano, pacifisma, facile legebla"
9. **Heliko sur deklivo**, Romano, **Arkadij kaj Boris Strugackij**, *Impeto*, 2007, 248 p. 16 €. Perek kaj Kandid provas respektive kompreni du malsamajn sistemojn: tiu de Administracio kaj tiu de Arbaro.
10. **Fabelo pri la triopo**, Romano, **Arkadij kaj Boris Strugackij**, *Impeto*, 2010, 192 p. 16 €. Longtempe malpermesata libro, sin mokanta pri iama misfunkciado de la soveta burokrataro.
11. **Skarabo en formikejo**, Romano, **Arkadij kaj Boris Strugackij**, *Impeto*, 2013, 184 p. 18 €. "Maksim Kammerer kaj Rudolf Sikorski devas kontraŭstari subitan danĝeron, kiu, probable, minacas la ekziston de la tuta homa raso".
12. **La burĝo kondamnita**, Romano, **Arkadij kaj Boris Strugackij**, *Impeto*, 2009, 352 p. 20 €. Diversdevenaj homoj eksperimentas je konstruon kaj organizadon de nova urbo.
13. **Kavaliroj de kvardek insuloj**, Romano, **Sergej Lukjanenko**, *Impeto* 2009, 224 p. 18 €. Dima kaj Inga alvenintaj kun aliaj gejunuloj en la Mondon de Kvardek Insuloj devas lukti por savi sian vivon.
14. **Vismar**, Romano, **István Nemere**, *Impeto*, 2008, 192 p. 18 €. Homo kaj hundo travivinte malfacilaĵojn renkontiĝas,
15. **Jesa**, Romano, **István Nemere**, *Impeto*, 2009, 184 p. 18 €. "kio okazus en la nuntempa mondo, se Jesuo Kristo revenus sur la Teron – sed ĉiokaze en korpo de virino? "

<b>Mendilo</b>	
Bonvolu sendi tiujn librojn:	al jena adreso:
	S-ro/ino
En	la
	Subskribo:

## Diskriminacio de la lingvoj

prelegis pri ĝi Jacques Pineda okaze de festivalo en Colmar en oktobro 2014

Kiel la Grondlandaj glaĉeroj, lingvoj kaj dialektoj en la mondo fandiĝas. El 6000 elnombritaj, la esploristoj prognozas, ke post unu jarcento 80 elcentoj malaperos. Ĉu pesimisma taksado? Eble, tamen konstatita estas, ke ĉiujare dekoj da lingvoj estingiĝas aŭ estas danĝere minacataj, aparte en Afriko kaj Azio sed ankaŭ en okcidento.

Kiaj kaŭzoj kontribuas al la programita morto de tiu altvalora homara heredaĵo? Ni parolu unue pri la lingvaj antaŭjuĝoj.

- unu el ili persistanta, kuŝas en la kredo, ke necesas eviti, eĉ forgesi, paroli sian gepatran lingvon aŭ dialekton pro tio, ke ĝi malhelpas la nacian lingvan lernadon (konsiderata kiel esenca ilo de socia promocio). Evidente malveras, ĉar neniu racia aŭ statistika klarigo pravigas tion. Male, dulingvismo estas riĉeco rilate la psikologian ekvilibron kaj plie malfermas pli da pordoj al la internacia labora merkato.

- -Alia antaŭjuĝo temas pri la lingva taksado. Iuj estus pli altvaloraj "sur la merkato". Do plibone elekti la plej divastigitajn tra la mondo laŭ la sankta principo de realeco. Sed lerni lingvon postulas motivadon, devas allogi, plezurigi. Motivado multe influas lernadon. Kial do neutile serĉi malfacilaĵojn, kaj preterpasi plezuron? Koncerne intereson pri utila lingvo ekzemple profesie, tio ne tute pravigas la nescion pri alia (j) despli ke oni ja scias ke utila profesie lingvo plejofte ne postulas altan nivelon (ĉiumaniere oni povas daŭre pliprofondigi ĝin se necese, kaj tre rapide post restado en la concernita lando)

- -Kurioza kaj amuza ideo aparte disvastigita de literaturo kaj teatro: estus lingvoj pli belaj pli mildaj. .k.t.p ol aliaj. Tiel la itala taŭgus por kanti, la franca por allogi, kaj la germana por hurlti. Tamen estas bonaj francaj tenoroj, grandaj italaj virlogistoj, kaj poeziplena germana literaturo.

- -Fine mi diras ke ofte fatalo trakuras la mensojn: ĉar necesas uzi internacian lingvon pro la tutmondiĝo, ni akceptu tiun, kiu jam estas la plej disvolviĝinta tra la mondo tio estas la angla. Sed tio signifas akcepti kulturen rezignon kaj favori troajn privilegiojn al la anglaj parolantaj landoj. Tio ne justas. Ĉiuj tiuj antaŭjuĝoj ŝajne sendanĝeraj, tamen kontribuas en la mensoj al starigo de hierarkio inter la lingvoj kaj obstaklas kolektivajn ekkonscion pri ilia erozio kaj la pezaj sekvaj konsekvencoj.

Sed kiuj estis kaj hodiaŭ estas ĝiaj kaŭzoj?

Ni menciu ke, kvankam raraj en nia historio, estis naturaj kaŭzoj: ekzemple la malapero de la loĝantaro "Tambola" kaj de ĝia lingvo post vulkana erupcio en Indonezia insulo en 1815. Sed la ĉefaj kaŭzoj estas ja politikaj ekonomikaj kaj kulturaj. Ĉiam invadantoj kaj koloniantoj tuj zorgis sufoki la lingvojn kaj dialektojn de la okupitaj teritorioj, por pli facile trudi sian superregadon. Hodiaŭ ankoraŭ plejparte de la afrikaj nacioj ta-

men sendependaj jam de pli ol 50 jaroj oficiale adoptis la ekskoloniantan lingvon "unu klimakso" multaj afrikanoj diris "oni trudas nin paroli en nia lando fremdan lingvon".

Sine de la ŝtato mem, la stultaj centralizadoj aŭ plimalbone la diktaturoj lamenis lingvojn kaj dialektojn. Sed bedaŭrinde ne sufiĉas la historia leciono: tiel la katalanoj kies lingvo tiom suferis

pro la frankista diktaturo dum 4 jardekoj, ne hezitis trudi sian lingvon al la indiĝenoj de la Balearaj insuloj, malaperigante ilian gepatran.

Tamen hodiaŭ la granda danĝero estas la angla kunpremanta rolo, unu timinda ekonomika kaj politika armilo de la ultraliberalismo kiu balaas la lingvojn en la mondo inkluzive de Eŭropo. Tiel Margareth Thatcher tute senĝene kaj laŭtege deklaris: "en la mondo la superreganta ŝtato estos Usono, la ekonomia sistemo la angla-saksa ultraliberalismo kaj la nura internacia lingvo la angla", programo kiu bone valoras pro ĝia klareco kaj verdiremo. Pri la financa donaco ricevita dank'al hegemonio de la angla lingvo, oficiala raporto de la alta konsilantaro pri la taksado (raporto Grin, 2005) informas nin: "Unuiĝinta Reĝlando nete enzepzas minimume jare 10 milionojn da eŭroj sekve de la angla lingva superregado, ŝparado esence farita en instruado de la fremdaj lingvoj. Sed se oni kalkulas iajn komponantojn ekzemple la lingvopezon en la internaciaj komercaj interŝanĝoj kiuj multiplikas tiun efekton, la ŝparo povas atingi 17 aŭ 18 miliardojn

Kaj unu el la estroj de la British Council deklaris "la nigra oro de Britio ne estas la petrolo sed la angla lingvo"

Ĉu ni povos ankoraŭ haltigi tiun mondan erozion? Jes mi opinias, almenaŭ eblos malakceli la fenomenon. Necesus:

- grava konsciiga laboro por lukti kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj indiferenteco pri ĝi por revalorigi kaj savii la minacitajn lingvojn kaj dialektojn (grava lerneja rolo)

- Tio postulas ĉefe memvolan politikan de la ŝtatoj kiuj cetere devas adopti kiel internacia ilo de komunikado, neŭtralan justan kaj facilan lingvon. Jam ekzistas tia lingvo: Esperanto.

- kaj finfine oni pli rapide iros antaŭen kiam konkretiĝos la projekto de supernacia instanco kiu taskos al si arbitracion de problemoj rilate al la respekto de la homaj rajtoj, la savo de nia planedo kaj kulturaj riĉeco de popoloj kaj nacioj: laboro de la mondcivitaneccar organizo.

Konklude, mi invitas ĉiujn malkovri Esperanton kaj sin registri kiel mondcivitanon.


Jacques Pineda

Urbo Goblinsk (Mikaelo Bronŝtejn) Eldonejo „Impeto“ Moskvo 2010

Dum siaj oftaj vojaĝoj tra la mondo Mikaelo Bronŝtejn ne ĉesas prikanti Rusion, precipe sian loĝregionon nunan apud Peterburgo. Tiu esperantoparolanta poeto, trubaduro, verkisto kaj eksa inĝeniero travivis la disfalon de Sovetunio kaj la ekon de la kapitalisma sistemo en tiu vasta landego.

La ĉefrolulo Maksim, en lia romano URBO GOBLINSK, inĝeniero – esperantisto - en la firmao RUSOPLAST kunrolas en la privatigoprocezoj de tiu uzino pri plastaj artikloj, kiu transiras de la rutina iel trankvila funkciado al nekonata estonto laŭ reguloj de la kapitalisma merkato. Intertempe sciatas en la mondo, ke tiu transiro ne facilis, necesis lerni kaj adaptiĝi. Iuj adaptiĝis ege rapide, eĉ se plejofte neleĝe, ŝmire, eĉ krime, kun la helpo de brutalaj mafianoj, kiuj kunlaboras kun avidegaj novaferistoj. Jesja! Bronŝtejn sukcesis verki specon de krimromano, en kiu estas envolvata la tuta rusa societo, inkluzive de la loka Esperantoasocio.

Meze de tiu socia anarĥio ĉiuj provas vivi kiel eble plej normale, eĉ se malnovaj amikecoj suferas en sistemo, kie la mono centras kaj konkurencigas. Dum la amiko Lazar ne eltenas kaj elmigras al Israelo, Maksim sukcesas adaptiĝi. Nu! Laŭlonge de la streĉa rakonto iu mirakla kuracilo „ŝajne“ flegas ĉiujn vundojn: la vodko!  
EL



Les coups.

(d'après le livre de Lena Karpunina "La bato")

Lorsque j'ai eu quatre ans et demi, mon père a demandé à ma mère de m'apprendre à lire. Il se considérait lui-même incompetent pour cette tâche, parce qu'il n'avait pas reçu un enseignement classique.

Ma mère gémissait, essayait de plaider que j'étais trop petite, mais tout fut vain. Je ne me souviens plus de quelle manière ma mère avait procédé, mais je me souviens du livre. Ce n'était pas un abécédaire, nous n'en avons pas.

Le seul livre dans notre foyer était un livre plus ou moins pour enfants, un grand et ancien volume relatif à la naissance des étoiles, avec des mythes et légendes grecques s'y rapportant.

Sous le regard de ma mère, je l'ai même lu avec intérêt. Mais, sans le contrôle de mes parents, j'oubliais aussitôt l'existence des étoiles.

Pendant la journée, lorsque mes parents travaillaient, je restais à la maison. Les jardins d'enfants étaient complets; pour y être accueillis, on devait encore s'inscrire sur une liste d'attente avant la naissance de l'enfant, ce qui n'était plus possible pour moi.

Au début, ils m'enfermaient dans une cabane en briques d'argile, et pendant des journées entières, j'étais assise derrière le grillage sur le rebord de la fenêtre, tendant mon oreille pour saisir les trilles des oiseaux et les voix des enfants.

Je ne pouvais même pas voir les enfants; une barrière entourait la cabane et, à travers ses fentes, parfois je pouvais voir, pendant une seconde, l'ombre de l'un d'eux ou un morceau de robe colorée.


Et alors, sans me gêner, je courais avec d'autres enfants à travers les petites rues poussiéreuses et pittoresques de notre quartier, fourrant mon nez dans les jardins étrangers ou bien dans un gigantesque tas d'ordures proche ou encore ailleurs.

La règle incontournable était que je devais de nouveau apparaître dans notre petite cour au moins quelques secondes avant le retour de mes parents.

J'y arrivais toujours, et mes parents pensaient que je passais la journée en jouant avec mes poupées et avec ma très belle dînette allemande et le mobilier de mes poupées, d'une fabrication très soignée et qui coûtait très cher.

Jusqu'à maintenant, je ne comprends pas comment ils pouvaient m'acheter des assortiments de jouets aussi chers. Nous vivions très modestement, pour ne pas dire pauvrement. C'était probablement une idée de ma mère.

Des nuages sont apparus sur mon firmament après mon apprentissage de la lecture. Mon père avait décidé que, chaque jour, je lisais un chapitre du volume consacré aux "étoiles" et le soir, après son retour du travail, je devais lui raconter le contenu de ma lecture. Comment cela fonctionnait, je ne le sais plus précisément. . .



traduit par Catherine ROUX,  
avec l'aide de Ginette MARTIN

Novaĵletero de Fokolar-Movado  
Novembro 2014



## “Nova Urbo”

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

Dum la kuranta jaro ni rememoras la datrevenon de fama franclingva sviso, kiun estimis ĉiuj esperantisto. Temas pri prof. **Edmond Privat** (1889-1962) kiu naskiĝis antaŭ 125 jaroj en Ĝenevo kaj studis en Parizo. Kiel junulo, li partoprenis la 1-an Universalan Kongreson en 1905 kaj impresis ĉiujn per sia oratora talento. Dum kelkaj jaroj li redaktis la “*Esperanto-revuon*” kaj poste estis elektita prezidanto de UEA. Antaŭ la dua mondmilito la geedzoj Edmond kaj Yvonne Privat veturis al Hindujo kie ili konatiĝis kun Mahatmo Gandhi. La du aktivuloj poste kunlaboris en la internacia porpaca movado, kies baza principo estis malakcepto de perforto. Dum kelkaj jaroj Privat estis honora konsilanto kaj vicdelegito de Irano ĉe Ligo de Nacioj. Post la milito Privat enkondukis Esperanton al Svisa Radio Internacia kaj ĝis la morto realigis tie E-elsendojn. Privat certe apartenas al la plej meritaj figuroj en la tuta historio de Esperanto-movado kaj ĝia literaturo. Liaj talenoj estis mirige multflankaj. Ĉi tie vi povas legi la tre kortuŝan kaj subtilan poemeton “*Lasta kiso*” kiun Privat verkis jam en sia junaĝo. Estas pensige, ke tiel melankolia kaj serioza temo povis naskiĝi en la junula kapo, kiam oni kutime rigardas vivon senzorge... Se tio plaĉas al vi, provu traduki ĝin en vian gepatran lingvon kaj sendu al ‘NU’. Tiumaniere ni ĉiuj povas honorigi memoron pri tiu eksterordinara homo.

### *Lasta kiso*

Kien vi flugas, papilio,  
Tremante kaj rapide?  
Jam mortis rozo kaj lilio  
Kaj venas frost' perfide.

Flugiloj viaj kvazaŭ lampo  
Briletas en nebulo.  
Kion vi serĉas tra la kampo,  
Perdita somerulo?

Dezertaj estas la ĝardenoj,  
Tra kiuj vagis amo via.  
Skeletoj ŝajnas la vervenoj  
Sub kverko senfolia.



Kial vi flugas en malvarmo  
Tra flora la tombejo?  
Sur ĉiu loko pluva larmo  
Nun restas en herbejo.

Silentas ĉiuj en la nestoj  
Kaj svenis bonodoroj  
Jam ne batalos vi kun vespoj  
Pri la floretaj koroj.

Jen restas nur en kampo vasta  
Velkinta krizantemo  
Sur kiu kiso via lasta  
Mortigos vin en tremo.

Aŭtuno kutime agordas homojn melankolie. La tuta naturo malrapidigas sian ritmon antaŭ la vintra dormo. Oni vidas ĉie foliojn perdi la verdecon, transiri al flavo, ruĝo aŭ bruno. Fine ili forfalos de la arbo, putriĝos kaj riĉigos la sojlon por novaj plantoj. Evangelio ankaŭ tuŝas tiun ĉi temon, dirante pri la greno kiu devas morti por doni la novan vivon. La sezono aŭtuna kulminias en novembro, la monato tradicie dediĉita al la mortintoj. Alude al tiu malgaja versaĵo (‘*Lasta kiso*’ de Edmond Privat), ĉi sube vi povas legi ion pli optimismen. Sube troviĝas kelke da pensoj el libro ‘*Hic et nunc*’ kio en la latina signifas: *Ĉi tie kaj nun*. Aŭtoris ĝin Chiara Lubich, fondinto de Fokolaro. estis ankaŭ kristano, do li kredis ke morton venkis Kristo. Tial (eĉ skribinte la “*Lasta kiso*”-n) li verŝajne ne ŝatus lasi sian leganton en malespero.

### Ĉi tie kaj nun (Pripensoj de Chiara Lubich)

“Rigardu ĉiam antaŭen, nieniam malantaŭen. Kio ajn estis en via vivo – jam okazis – kaj Dio scias tion. Nur unu afero gravas nun: *ne perdi la kurantan momenton, ĉi tiun unusolan aĵon kiun vi vere havas en la manoj. Nur en la nuna momento ni povas ami Dion tutkore kaj plenumi Lian volon. Ni povas bone plenumi la devojn nur kiam ni vivas en la kuranta momento. Se ĉi tiun momenton ni travivas intense, ni trovos dignosenton je ĉio, kion ni faras – sendepende kiel ajn malgranda tio estus. Krome, kun alveno de vespero, ni ĝoje rememoros tiajn momentojn. Rigarde laŭ ĉi tiu perspektivo, nia vespera konsci-ekzameno montriĝos multe pli facila. Se ni vivas en nuntempo, Dio vivas en ni. Kaj se Dio estas en ni, tiam amo en ni fruktas. Homoj vivantaj en nuntempo estas paciencaj, ĝentilaj, libere apartaj de ĉiuj objektoj”.* \*

“Città Nuova” (Nova Urbo) estas internacia soci-kultura magazeno de Fokolara Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj kaj komunumoj, kaj krome – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, religioj kaj sistemoj. Ankaŭ vi povas kontribui al konstruado de unueco kaj popularigo de Esperanto. Sufiĉas nur traduki al via lingvo kion interesan vi trovas ĉi tie kaj publikigi en via loka gazeto aŭ simple disdoni inter viaj konatoj.

## Aliĝilo 77a Regiona Staĝo de Esperanto en Verdun la 3-5ajn de aprilo 2015 en Collège Saint-Jean, 73 rue de Blâmont, 55100 VERDUN

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝkotizo	Elektita kurso	
1		ĉef-aliĝanto				<b>Provizora Programo:</b> <b>Vendrede 3-an de aprilo 2015</b> <ul style="list-style-type: none"> <li>• 17a Akcepto de unuaj alvenantoj</li> <li>• 17a30 eblas libere viziti</li> <li>• 19a30 Vespermanĝo</li> <li>• 21a45 Malfermo de la knajpo.</li> </ul> <b>Sabate 4-an de aprilo 2015</b> <ul style="list-style-type: none"> <li>• 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo</li> <li>• 9a30 Vizito al la malnova urbo</li> <li>• 12a Reveno al la staĝejo</li> <li>• 12a30 Tagmanĝo</li> <li>• 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj</li> <li>• 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo</li> <li>• 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E.</li> <li>• 19a30 Vespermanĝo</li> <li>• 20a30 Distra vespero: <i>La Kompanoj</i> Grupo de Marcel Redoulez.</li> <li>• Knajpo</li> </ul> <b>Dimanĉe 5-an de aprilo 2015</b> <ul style="list-style-type: none"> <li>• 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo</li> <li>• 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E</li> <li>• 12a30 Tagmanĝo</li> <li>• 14a Ebleco viziti la batal-kampojn</li> <li>• Ebleco partopreni la programon de Sat-Amikaro</li> </ul>
2		kun-aliĝantoj				
3						
Adreso						
<b>Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperos en nia retejo:</b> <a href="http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr">http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr</a> Samtempe okazos Sat-amikara kongreso kun tuttaga ekskurso la 7an de aprilo, al kiu eblos aparte aliĝi.						
Mi planas alveni la			je la			
Mi planas forveturi la			je la			
Mia adreso ne aperu en la staĝo-dokumentoj (signu) <input type="checkbox"/>						
Telefono:			Ret-adreso:			
Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: ..... per ĉeko <input type="checkbox"/> per ĝiro <input type="checkbox"/> al André Grossmann per internacia ĝiro <input type="checkbox"/> al nia peranto en Germanio <input type="checkbox"/> Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.						
Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo <input type="checkbox"/> kaj liston de proksimaj hoteloj <input type="checkbox"/> (signu)						
<b>Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en collège Saint-Jean</b>			Ven-drede	Sabate	Di-manĉe	
Tagmanĝo						
Vespermanĝo						
Tranoktado en "Collège Siant-Jean: nombro da personoj						
Lito-prefero: individua lito <input type="checkbox"/> duobla lito <input type="checkbox"/> Ĉambro-prefero en 3-persona <input type="checkbox"/> 4-persona <input type="checkbox"/> 5-persona <input type="checkbox"/>						
Mi preferas tranokti en hotelo kaj mem zorgas pri la rezervado kaj matenmanĝoj.						
<b>ALIĜOJ</b>			antaŭ la 1a de februaro 2015	ekde la 1a de februaro 2015		
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio			20 €	25 €		
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)			15 €	20 €		
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj			2 €	4 €		
<b>Restado en plurlitaj ĉambroj de collège Saint-Jean</b>						
Tranoktado en plurlitaj ĉambroj: 8 € Lito-tuko: 4,30 €						
Mantenmanĝo: 3 € Manĝo en la memservejo: 8,50 €						
<b>A: Komencantoj (débutants)</b> <b>C: Progresintoj:</b> <b>D: Prelego:</b> <b>Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :</b> André Grossmann 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM <b>Ĉekoj nome de:</b> André Grossmann <b>Internaciaj ĝiroj al: IBAN:</b> André Grossmann FR6920041010150081934U669 <b>BIC:</b> PSSTFRPPSTR <b>Por Germanio al nia peranto:</b> je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago) Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen <b>Pliaj informoj ĉe Catherine Kremer:</b> catherine.kremer57@gmail.com Tel. 03.29.85.05.09 poŝtel. 06.02.13.01.32						

## Fruktodona kunlaboro albana-pola

Bardhyl Selimi, sekretario de la Albana Esperanto-Asocio

Ekde tri jaroj, laŭiniciate de samideano pola Tomasz Chmielik el Świdnik, startis la projekto de la antologio en Esperanto de la albana moderna beletro. Tion tuj subtenis la albanaj esperantistoj. La unua produkto estis la romano "La Hunda Haŭto" de la renoma verkisto samtempulo Fatos Kongoli. Temis ne simple pri plia fremdlingva traduko de eroj el la albana beletro, sed ankaŭ pri serioza kampanjo por enkonduki la internacian lingvon en la vicoj de la verkista elito de la lando. Tion respegulis klare kaj brile la aktivecoj aranĝitaj ĉi-



En la Nacia Biblioteko de Prishtina



Meze: s-ro Adem Demaçi

kaze dum semajno en aprilo 2011 en Tirana (solena promocio de la libro en la Akademio de Sciencoj, intervjuoj kaj artikoloj ĉe multaj TV-kanaloj kaj ĵurnaloj, renkontiĝo kun studentoj kaj profesoroj de la Fremdlingva Fakultato kaj aliaj. Tiam vizitis nin krom Tomasz ankaŭ 15 aliaj polaj esperantistoj.

Simila semajno propaganda pro kaj por Esperanto okazis antaŭ nelonge, ĉifoje ne nur en Tirana, sed ankaŭ en Priština, ĉefurbo de Kosovo, kie estis promociita volumo de poeziaĵoj de la verkisto Eqrem Basha. Unuafoje, post la jaro 1990, en la Nacia Biblioteko de Prishtina, grupo de albanaj verkistoj el Kosovo, inkluzive Adem Demaçi-n, laŭreato de la porpaca premio Saĥarov kaj konsiderata kiel "Mandela" de Kosovo, interbabilis kun s-ro Tomasz Chmielik pri la graveco de Esperanto kiel neŭtrala universala lingva komunikilo kaj promociilo de la kulturo de la malgrandaj nacioj, unuavice.

Oni estas enesperantigintaj ĝis nun almenaŭ 20 romanojn el la albana beletro, kiuj atendas la eldonadon paŝon post paŝo, krom kvin aliaj jam aperintaj dum la periodo 2011-2014 ("Lundo en sep tagoj" de Luljeta Lleshanaku, "Sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliĉka, "La Polino" de Bajram Karabolli, "Hunda Haŭto" de Fatos Kongoli, "La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj" de Eqrem Basha).

Menciindas ke en ĉi tiu kampanjo notindan kontribuon donas ankaŭ aliaj nealbanaj samideanoj kiel s-ro Edmond Ludwig, s-ro Josip Pleadin, s-ro István Ertl, s-ro Carlo Minnaja. Do temas pri internacia solidareco kun albanoj!

La kampanjo celadas la sentemigon de la enlanda opinio pri Esperanto kaj akiron de pliaj simpatiantoj kaj subtenantoj el la sino de verkistoj.

Bardhyl Selimi

Tomasz Chmielik kaj Ylljet Aliĉka



Shaban Hasani, Bardhyl Selimi, Naun Kule




La Unua Mondmilito estis unu inter la temoj pritraktitaj dum la aŭtuna Esperantostaĝo organizita de BAVELO en Sankt-Peter, de la 17-a ĝis la 19-a de Oktobro 2014. Jen elтираĝo el LA INFORMILO de 1955, kiu memorigas pri la rea varbado kaj instruado post la Unua Mondmilito en Nancy, en Marto 1926. Ĝin havigis al ni Sinjorino Irmtraud Bengsch.

N° 19

Trimestrieli

Janvier 1955



La

— Le numéro : 5 fr. —  
Abonnement : 20 fr. par an.

ESPERANTO

INFORMILO

Bulletin de la Fédération de l'Est  
de l'Union Espérantiste Française  
et de la Jeunesse Espérantiste de France

## ESPERANTO EN LORENO POST LA UNUA GRANDA MILITO

**I**NTER la malfeliĉaj sekvoj de la milito (1914-18) ni, esperantistoj, bedaŭras la malaperigon de la jam grava *Nancia Grupo de la SFPE*, grupe pri kiu ni parolis en *La Informilo* de oktobro 1954.

Kelkaj esperantistoj izolitaj en Nancy fine konatiĝis unuj la aliaj kaj celis revivigi la grupon esperantan. Gvidataj de S-ro LAIGNIER, advokato, ili zorgis pri progagando. Dank'al la bonvolo de S-ro LAURENT, dekano ĉe la fakultato literatura, Profesoro SCHMITT povis fari publikan prelegon jaŭdon 25<sup>an</sup> de marto 1926. Jen kion skribis la gazeto *Est Républicain* :

« Jeudi soir devant une assistance nombreuse et vivement intéressée, M. Schmitt, professeur, a fait l'exposé de l'état actuel de l'Espéranto.

« M. Dutil, en quelques phrases d'un tour fort agréable, présenta le conférencier.

« M. Schmitt, après avoir parlé de la nécessité d'une langue internationale, écarta le choix d'une langue morte ou d'une langue nationale vivante. Il exposa les qualités que l'on peut demander à une langue artificielle et montra par de nombreux exemples que l'Espéranto les possède toutes.

« Mais, ce qui est plus important que tout, c'est la vie intense actuelle de l'Espéranto qui se développe dans tous les milieux.

« Toute personne désireuse d'étudier cette langue ou de favoriser sa diffusion pourra s'inscrire chez M. Weigel, 92, Grande-Rue, à Nancy ».

Certa nombro da personoj enskribiĝis kaj kerno de esperantistoj denove ekzistis en Nancy. De tiam la intermilita esperanta movado en Nancy ekiris antaŭen.



## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2015 ĝis 2017


Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2014 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2015.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2014, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf duonkoste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 3 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2015	2016	2017
		Abono por papera versio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj por UFE membro:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA</b>	MG	• Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado.			11 eŭroj
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).			26 eŭroj
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Espéranto</i>			64 eŭroj
Kiel Pagi?	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2015 por 1208				
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2015, 2016				
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	<b>4. Per internacia ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)				


  
 Le masque des jours de fête (Jean-François SCHWAIGER) Le Verger Editeur
   
*Le masque des jours de fête* estas la unua rakontaro de juna samideano el la grupo de Strasburgo, Jean-François SCHWAIGER. Jam li ricevis premiojn pro diversaj rakontoj kaj partoprenis en la libro-foirejo de Colmar en Novembro 2014. La tre plaĉa libreto estas mendebla en ĉiu ajn librovendejo.
   
 Ni deziru pliajn sukcesojn al nia samideano, eble baldaŭ pro verko en Esperanto.
   
 E.L.

## Nos cotisations 2015

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2014. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2015 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2015 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

### COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

#### 1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2015 por 756*
  - par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:  
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
  - Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse. Indiquer votre adresse courriel pour l'abonnement version pdf.
- Nova** • Une cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que  $20 - 66\% = 6,80$  euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2015	2016	2017
Abonnement à <b>La INFORMILO</b> version papier	15 €	15 €	15 €
Abonnement à <b>La INFORMILO</b> version internet (format pdf)	7,5 €	7,5 €	7,5 €
Adhésion à l'Association <b>Espéranto France-Est</b> (à rajouter à l'abonnement)			
• <i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
• <i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficiaire de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €
• <i>Même cotisation pour les membre de UFE</i>	16 €	16 €	16 €

#### 2. Association Internationale UEA (cotisations 2015)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

<b>UEA</b>	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	11 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	26 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	26 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	64 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	64 €

#### 3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2015)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2014 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

**Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.**

<b>UFE</b>	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2015)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Première année	10 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
	Abonnement au magazine bimestriel <b>Le Monde de l'espéranto</b> .	+18 €

### IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- 2) Les cartes de membre de l'année 2015 et éventuellement de l'année 2016 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres.
- 3) Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2014 recevront un reçu fiscal pour bénéficiaire de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2015.

## Belega somera libertempo

Kadre de la projekto „SummerJob” 130 gejunuloj venis al urbeto Broumov, en nordokcidenta parto de Ĉeĥa Respubliko. Apud la urbeto la junulara grupo laboris komence de la ĉi-jara somero por helpi al 90 familioj en ses vilaĝoj. Tiun projekton komencis junularo de ĉeĥa Fokolaro antaŭ kvin jaroj. Ekde tiam ĝi okazas ĉiujare dum la somera libertempo. Tiam la vilaĝa lernejo ne estas uzata kaj ili povas en ĝi dormi.



Labortaskoj estis diversaj: haki kaj stokigi lignon por vintra sezono, tranĉi herbon, farbigi fenestrojn, purigi agrikulturajn konstruaĵojn kiel bovinejo kaj ĉevalejo, ripari grenej-tegmentojn kaj eĉ ponteton. La geknaboj laboris kun vilaĝanoj surkampe, en ĝardenoj, kio helpis fortigi amikajn rilatojn en la komunumo. Sed “Somerlaboro” ne signifas nur laboron. Posttagmeze la urbeto transformiĝas je kantino. Tie la junularo povis renkontiĝi post reveno el kampoj. Ili kantis, aranĝis teatraĵojn aŭ aliajn kultur-eventojn. Spirita flanko ankaŭ ne estis forgesita. En malnovaj preĝejoj ili partoprenis Di-servojn kun muzik-konzertoj, kune kun la vilaĝanoj. Tiel naskiĝis amikeco inter la gejunuloj kaj loka loĝantaro. La projekto daŭras jam tri jarojn kaj poste komenciĝos la sekva, jam en aliaj regionoj. Pri tia somerado en Broumov aperis novaĵoj en gazetaro kaj la ĉefa televido ankaŭ raportis tutlande.

## Balkanio – solidareco dum tragedio

En sudorienta Eŭropo loĝantoj de Balkanaj landoj suferis pro danĝera inundo, la plej granda ekde 120 jaroj. Helpe rapidis multaj organizaĵoj, movadoj kaj privataj personoj. Akvo impete transfluis la river-bordojn kaj kovris vastajn terenojn de la eksa Jugoslavio en Kroatio, Serbio kaj Bosno. Antaŭ ol oni sukcesis kontroli la situacion, ĉirkaŭ 50 homoj perdis la vivon. Precipe danĝera situacio ekzistis en la komunumoj lokitaj laŭ Sava-rivero. En la regiono kun 400 mil loĝantoj, oni devis evakui 25 mil.



Ekde la komenco reagis eksterlandaj organizaĵoj el Eŭropa Unio, Ruslando kaj el aliaj landoj. La kampanjo estis grava, kvankam lokaj loĝantoj ankaŭ apogis unu la alian. Pere de internacia organizaĵo „Caritas” la katolika Eklezio organizis helpon al serbaj komunumoj, plej ofte ortodoksaj. En la urbo Ŝid (Vojvodino), loka episkopo gastigas multajn evakuitojn. Dum tiel granda dramo neniu konsideras al kiu eklezio oni apartenas – ni ĉiuj estas simple homoj. Ankaŭ membroj de Fokolar-movado aliĝis kun helpo. „La danĝeron pligrandigas la ŝove falantaj grundoj kaj detruo de ĉiuj plant-kultivoj, kio dumtempe kaŭzas mankojn de manĝaĵo” – ili skribis. – „Sed la konkreta helpo estos bezonata kiam ni komencos ripari la damaĝitajn domojn inter kiuj, bedaŭrinde, multaj ne plu taŭgos por loĝado”. El urbo Slavonski Brod raportis Ŝeljka: „Multaj homoj pretas veni kun helpo al viktimoj de ĉi tiu natur-katastrofo. Tage kaj nokte la volontuloj plenigas sakojn per sablo kaj konstruas eskarpojn por haltigi la disfluantan akvon”. Al ili oni konstante alportadis ion por manĝi kaj trinki. Kiuj ne povis alveni kun helpo, tiuj preĝis. Homoj perdintaj ĉion loĝas en provizoraj ŝirmejoj aŭ trovis lokon en la domoj de bonkoraj familioj. En kvin diocezoj estis organizita dimanĉa mon-kolekto por tiuj plej severe frapitaj per tiu kataklismo. Tia solidareco tre pozitive impresas ĉiun, kiam oni vidas multajn homojn sindediĉe kaj kuraĝe labori por savi la malfeliĉulojn.

## Stano Marĉek turneis tra Francio

Post prelego en Cornimont Stano Marĉek ankaŭ prelegis en la kulturdomo de Gérardmer, kie lin aŭskultis deko da scivolemuloj. Li tre atentokapte prelegis, unue pri fungoj, poste pri sanigaj plantoj. Kvankam granda parto de la ĉeestintaro jam konis la prezentitajn plantojn, ili miris pri la sanigaj efikoj de tiuj tutnaturaj produktoj. Ilustris la prelegojn projekciitaj bildoj.



Tradukis iom-post-iome Ginette Martin, kiu cetere gastigis la preleginton. La prelegoj finiĝis per komuna kantado kun gitara akompano fare de Stano antaŭ agrabla kuna manĝado de kukoj alportitaj de kelkaj partoprenintinoj. Krome eblis aĉeti kursmaterialon kun KD-oj plej diversstemaj de lia rektmetoda Esperantokurso publikigita kun klarigoj en 34 diversaj lingvoj!!! Venonttage Stano pluturneis tra Francio. E.L.

## Bonvenon en Kunming

Venontjare okaze de la **67a-IFEF kongreso en Kunming** eblis vojaĝi en **Ĉinio** kaj malkovri **Yunnan**, la plej belan provincon el la tuta **Ĉinio!** Ĝi enhavas tre diversajn kaj belajn pejzaĝojn. Loĝas ĉi-tie mozaiko de popoloj kun multaj kulturoj. **Kunming** oni nomas "**la printempa urbo**", ĉar la klimato estas ĉiam dolĉa en la kvar sezonoj. Mirindaj parkoj kuŝas en la urbo!

Mi ankoraŭ ne vizitis **Yunnan** kaj **Kunming** sed mia edzino, kiu spertis multe da vojaĝoj en **Ĉinio**, rakontas al mi pri tiu mirinda provinco kaj rekomendas al vi, karaj legantoj kaj geamikoj, partopreni la kongreson, kiu okazos de la **16-a ĝis 23-a de majo 2015**. La loka kongreskomitato LKK @: [la67ifk2015@126.com](mailto:la67ifk2015@126.com) kaj **Ĉina Fervoja Esperanto Asocio (ĈFEA)** organizas interesan programon kaj ekskursojn.

**Bonvenon en Ĉinio kaj Kunming. Ni atendas vin!**

Bruno HENRY



**La 67-a Kongreso de IFEF  
Kunming, Ĉinio 16-23.05.2015**

**第67届国际铁路员工世界语大会  
中国·昆明**

## Activités Espéranto-Thionville

### Conférences diaporama au Gueulard à Nilvange

Elles sont animées par des Espérantistes Étrangers dans le cadre des tournées de conférence organisées par Espéranto France:

- 10/03/2014 Le **Tadjikistan** avec **Svetlana et Firdaus SUKUROV** 30 participants
- 25/06/2014 **Cuba** avec **Miguel Angel GONZALES** 20 participants
- 04/09/2014 **Voyages en Chine** avec **Manjuan et Bruno HENRY** 30 participants



De nombreuses questions ont été posés par les auditeurs esperantophones et non esperantophones.

Nous organisons ces conférences avec l'Association Forum des Citoyens de Nilvange et le Café Le Gueulard. Ces soirées ont été annoncées dans le Républicain Lorrain.

Nous espérons en organiser encore pour 2015. Déjà nous prévoyons d'organiser une soirée diaporama avec **Bruno HENRY "Voyage en Iran"** au café Le Gueulard à Nilvange fin juin ou début septembre 2015.

### Cours d'Espéranto:

Les cours pour débutants et de perfectionnement ont lieu chaque jeudi de 18H00 à 20H00 à la maison de quartier Jacques Prévert 10 boucle des Près de Saint-Pierre à Thionville.

Informations Bruno HENRY @: [bruno.henry.esperanto@gmail.com](mailto:bruno.henry.esperanto@gmail.com)

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

En fichier joint article RL Famille Sukurov et Redon à Flévy, photo conférence Chine à Nilvange et logo Espéranto-Thionville.



**Le Républicain Lorrain** du 18.08.2014

**FLÉVY le 15/03/2014 à 05:00 L'espéranto voyage**

Les familles Redon et Shukurov, adeptes de l'espéranto.

Svetlana et Fridaus Shukurov, espérantistes, citoyens du Tadjikistan, ont fait étape chez Simone et Marcel Redon à Flévy. Invité du club Espéranto de Thionville, ce couple est arrivé par avion de Douchanbé, la capitale tadjike, à Saint-Pétersbourg en Russie. Puis un autre coup d'aile les a menés jusqu'à Berlin puis Bonn en Allemagne. Instituteur, professeur, guide de montagne, maintenant à la retraite, Fridaus Shukurov continue d'enseigner l'espéranto et participe avec son épouse à de nombreuses rencontres dans le monde.

En tournée à travers la France durant ce mois de mars, le couple va visiter Bourg-en-Bresse, Lyon, Paris, Angers, Saint-Brieuc, Caen, Amiens. A Nilvange, il a donné une conférence pour permettre de mieux connaître le Tadjikistan, pays lointain et mystérieux, méconnu des Occidentaux.



# Vojaĝoj tra Ĉinio

Raportas Bruno Henry

## Vivo en Ĉinio

Mi vivas alterne en **Ĉinio** kaj en **Francio** kun mia edzino. Ni estas junaj franc-ĉinaj emeritaj fervojistoj kaj esperantistaj geedzoj. Ni interkonatiĝis **dank'al Esperanto**. Somere ni loĝas en **Francio** kaj dum malpli varmaj sezonoj ni restadas pli longe en la fervojista kvartalo de la urbo **Ĉangŝa** (*Changsha*).

**Ĉangŝa** estas ĉefurbo de provinco **Hunan** en suda **Ĉinio**. Por mi estas giganta urbego (*2,5 milionoj da loĝantoj, entute 6 milionoj kun ĉirkaŭurbo*). Ĝi aspektas pli granda ol **Parizo**, ĉar tie staras multe da altaj domoj sur granda vasteco! Gracia mia edzino diras al mi ke tiu urbo estas ĉina mezurbo!

Imagu la kontraston, kutime mi vivas en franca lorena urbeto **Nilvange**! Ĝenerale ĉinoj estas agrablaj kun mi! Familianoj kaj geamikoj de mia edzino ĉiam bone gastigis nin! Foje mi perdiĝis en la urbo vespere. Mi demandis, kie estas nia strato; Juna viro de la urbo **Kantono** helpis min kaj akompanis min per taksio ĝis nia domo! Li eĉ pagis la ŝoforon kaj insiste rifuzis, ke mi repagu al li! Mi iom post iom mi alktumiĝis al ĉina manĝaĵo! Mi uzas manĝbastonetojn. Sed pri ĉina lingvo mi nur scias kelkajn vortojn. Pro tio mi sentas min iom izolita ĉar ne povas babiladi kun ĉinoj! Mi devas pli serioze lerni la ĉinan lingvon! La vetero estas tre ŝanĝema, vintre estas tre humida kaj iom malvarma, printenpe pluvegas tre ofte kaj somere varmegas multe!



Changsha Fervojista Kvartalo

## Nia fervojista kvartalo

Nia kvartalo estas en la urbocentro proksime de la stacidomo. Ĝi estas vilaĝo kun preskaŭ cent domoj sufiĉe altaj 6 ĝis 9 etaĝoj, granda turo de pli ol 20 etaĝo, kaj 20-etaĝa regiona sidejo de fervojo. Ŝajnas ke mi estas la nura eksterlandano ĉi tie! Ĉe en la urbo mi vi-

das malofte eksterlandanojn! Kelkfoje oni rigardas min kiel kuriozaĵon, ĉefe kiam mi promenas kun mia edzino aŭ mia bopatrino. Kun mia bopatrino 93-a jaraĝa ni salutas aliajn fervojistajn emeritulojn, kiujn ŝi konas de longe. Tiu emerita fervojistino ankoraŭ kapablas supreniri la ŝtuparojn ĝis la 7a etaĝo kie estas nia loĝejo! La familianoj de mia edzino estas fervojistoj kiel mi! Nun najbaroj scias, kiu mi estas, dank'al mia bopatrino! Homoj diskutas sidante sur benkoj, ludas kartoludojn kaj maĝangon "mahjong". En la sportejo maljunuloj ludas krocketon kaj junuloj ludas volejbalon. Foje, je la tria matene, eksplodis petardoj por anonci forpason de



maljunulino! Matene, oni rapide muntis grandan tendon apud nia domo. Ĉi-tie homoj manĝis, kaj blovorkestro el 25 viroj vestitaj kiel soldatoj muzikis! Kantistis ĉe mikrofono, sinsekve kantistino kaj kantisto ĝis vespere. La sekvan tagon, pluraj viroj portis la ĉerkon per longa stango, tra la tuta kvartalo. Tiu-ĉi pendas ĉe la stango per ruĝa ŝtofo ĉirkaŭante ĝin. La blovorkestro postsekvas muzikante la ĉerkon kaj malantaŭe la homoj! Ĉinoj cindrigas la korpojn kaj oni entombigas ilin en tre malgrandan tombon.

Petardoj preskaŭ ĉiutage eksplodas en **Ĉangŝa**, por festi ion aŭ eble anonci forpason aŭ feliĉan geedziĝon! Dum printempa festo eksplodas multaj petardoj! Sub la domoj en teretaĝo troviĝas diversaj butikoj, malgrandaj restoracioj, frizistoj, riparistoj de televidiloj kaj varmigiloj ktp. . . Oni vendas legomojn, fruktojn kaj viandaĵojn sur plataĵo de tri-radaĵ bicikloj aŭ tri-radaĵ elektraĵ skoteroj sur la trotuaroj. En proksima bazaro aĉeteblas diversaj legomoj, fruktoj, kapsikoj, vivantaj birdokortaj bestoj kaj fiŝoj, kiujn oni buĉas surloke por la klientoj. Diversaj odoroj de kapsikoj, tofuo (*tofuo estas origine azia manĝaĵo farita el sojfaboj*), kaj rostitaj viandaĵoj bonodorigas la stratojn ĉirkaŭ la bazaro. Surstrate, en nia kvartalo, akriĝas alvokas homojn, per eta laŭtpa-



Changsha komerca strato

rolilo, por akriĝi tranĉilojn, kaj feraĵisto kolektas feraĵojn. En nia kvartalo kaj urbo multaj restoracioj malgrandaj aŭ grandaj proponas tre diversajn bongustajn manĝaĵojn de la provinco Hunan aŭ de alia provinco. Nekredebla estas la nekalkulebla nombro de vendejoj en la tuta urbo. Oni vendas ĉion! Ĉe nia strato multaj butikoj vendas amase multajn komputilojn, printilojn, fotokopiilojn, poŝtelefonojn ktp. . . Hejme per kabla televido, krom multaj ĉinaj programoj, ni ricevas fakan programon de la fervojo pri fervojaj aktualaĵoj! Foje Gracia montris al mi libron pri stacidomo de **Ĉangŝa**, kie ŝi laboris kiel oficistino. Tiun libron fervojo eldonis ĝin okaze de 30-a datreveno de la stacidomo! Mi vidis en tiu albumo multajn fotojn pri fervojista laboro, grupo de kantistoj, muzikistoj kaj sportistoj. Oni fotis grupojn de fervojistoj, eĉ oficist (in) ojn en uniformo kiuj aspektis soldatoj!

## Vivnivelo kaj ekonomio

La vivnivelo en **Ĉinio** ĝenerale pliboniĝis post la epoko de **Mao** sed ne por ĉiuj! Nun estas multaj riĉuloj, mezriĉuloj kaj pli multe da malriĉuloj. Riĉuloj kaj mezriĉuloj vivas en pli luksaj domoj, en kvartaloj sekurigigitaj per bariloj kaj de gardistoj kiel en **Usono**! En la kamparo la homoj estas pli malriĉaj ol en la urbeĝo. Pro tio multaj kamparanoj laboras ĉie-tie. Ili konstruas domegojn, vojojn kaj subterajn trajnon por akiri monon, laŭdire. Plurfoje mi vidis domaĉojn, sen fluanta akvo, kie vivas malriĉuloj eĉ malriĉaj fervojistoj! Ofte mi vidis tre mizerajn homojn surstrate! Kontraste, luk-

sajn vestaĵojn, brakhorloĝojn, juvelojn, vinon, aŭton el la plej famkonataj kompanioj el la tuta mondo oni vendas en **Ĉangŝa** kiel en ĉiuj grandaj urboj de **Ĉinio**. En la urbo multaj tre luksaj hoteloj, restoracioj kaj bankoj estas nombraj!

En **Ĉinio** oni nomas la ekonomion “merkata socialismo” sed estas vera kapitalismo! Ĉie regas kulturo de laboro kaj de mono! Ĉiutage, eĉ dimanĉe oni laboras, eĉ en banko, poŝtoŝtanco; oni konstruas domegojn, vojojn kaj subterajn trajnon. La 1-an de majo, bankoj estis malfermitaj, nur ŝtataj oficejoj ne funkciis kaj lernantoj feris dum la tri labortagoj. Sed la sekvantan dimanĉon malfermiĝis denove la ŝtatoŝtancoj. Multaj vendejoj funkcias ĝis malfrue vespere. Oni ne rajtas striki kaj manifestacii! **Ĉinio** estas tre produktivema lando! Ĝenerale ĉinoj estas laboremaj! En ĉionvendejoj kuŝas



Changsha Parko Saŭen

amaso da varoj kiel en okcidentaj landoj! Certe multe da neutilaj objektoj, kiujn oni ĵetos en rubujon post kelkaj monatoj! Do, malŝparo de materialoj kaj energio kiuj endanĝerigas la estontecon de nia blua planedo kiel en multaj landoj!

## Densa trafiko!

Tiu urbeĝo estas tre laciga ĉar la trafiko estas tre densa kaj ŝoforoj kutimas hupadi, kiam ili alprokismiĝas al aliaj veturiloj aŭ piedirantoj! Ŝajnas ke la stirantoj havas pli da rajtoj ol la homoj piedirantaj! Ĉiam mi atentas, ĉar multaj elektraj skoteroj silente preterpasas piedirantojn tre proksime kaj transiras vojkruciĝon eĉ kiam la semaforo ekruĝiĝas! Busoj en la urbo veturas tre rapide kaj bremsas forte kaj subite! Oni devas firme sin teni en busoj! Malnovaj traktoroj, kiuj transportas diversajn varojn paf-krakas kaj elirigas nigran fumon! Fine de aprilo ektrafikis en **Ĉangŝa** la unua subtera trajna linio (N°2) 22 km-ojn longa. Ĝi estas tre moderna kaj iras de stacio **Wangchengpo** al **Guangda** tra la ĉefa stacidomo kaj la suda stacidomo (TGV). Nia kvartalo estas proksime de haltejo **Yuanjialing**! Ĉirkaŭ 2020-aj jaroj, la subtera trajna reto enhavos 6 linian kaj 314 kilometran (pli longa ol en Parizo)! Ĉinoj konstruas trajnojn kaj boradas tunelojn rapide!

## Vizitindaĵoj en Ĉangŝa

**Ĉangŝa** en 1938 estis incendita fare de **Kuonmitang** regita de **Ĉiang Kai-Ŝek**, por ke japanoj ne povu preni la riĉaĵojn de la urbo. La urbo perdis sian tutan 2 500-jaran historian heredaĵon! Pro tio estas malmulte da vizitindaĵoj. Nur la urba kaj provinca muzeoj, kiujn oni rekonstruas, estas interesaj. Laŭ mi la ĉefaj, plej agrablaj kaj kvietaj vizitindaĵoj estas la diversaj parkoj, grandaj aŭ malgrandaj, kie homoj povas feliĉe ripozi, promeni, boati, muziki, danci, gimnastiki kaj praktiki **Tajĝiĉuano** laŭ ritmo de bela ĉina muziko! La ĉinaj parkoj estas tre arte aranĝitaj kun gazono, floroj, arbus-toj. Rande de **Ĉangŝa** mi vizitis la monton **Yuelu**, kie staras antikva universitato kaj bela arbaro kun multaj vojetoj. Tre plaĉas al mi la tre granda parko de **Martiroj** ĉe granda lago, en kies mezo estas insulo kun pago-doj. Ĉinaj turistoj pilgrimas ĉefe en insulo **Oranĝo**, kie staras enorma kapo de la juna **Mao!** Insulo **Oranĝo** kuŝas meze de tre larĝa rivero **Xiang Jiang**. **Mao Zedong** naskiĝis proksime de **Ĉangŝa** en urbo **Shaoshan** kaj poste li lernis en **Ĉangŝa**. Ĉi tie naskiĝis la ĉina komunismo!



Guillin

## Vojaĝo per trajno

Pasintjare kaj en la nuna jaro, dum entute 8 monatoj, dank'al Gracia mi vizitis en **Ĉinio** multajn vidindaĵojn, antikvajn urbojn, montarojn, belajn naturlokojn! Ni renkontis esperantistojn en kelkaj urboj kaj partoprenis E-on aranĝon en **Wuhan** kaj **Zaozhuang**, kie staras



La Ŝtonarbaro en Kunming

tute nova **Internacia Esperanto Muzeo**. Mi rakontas pri tiuj lokoj kaj urboj en mia longa vojaĝkajero: **Shaoshan, Xiangtan, Kantono, Shenzen, Insulo Hainan, Wuhan, Nanchang, Hangzhou, Ŝangajo, Suzhou, Wuxi, Guilin, Zhangjiajie, Pekino, ĉina murego (Badalin), Tianjin, Zaozhuang, Tai'erzhuang, Lago Weishan, Qufu, Huainan, Yueyang, Xian, Yenan, Hohhot kaj Baotou**. Por atingi tiujn lokojn ni veturis per trajno sur pli ol 18 000 km-oj da trakoj. Ni vivis tage kaj nokte en malmola kuŝvagono aŭ veturis kelkajn horojn per fulmrapidaj trajnoj je ĉirkaŭ 320 km/hore. Kuŝvagonoj estas tre popularaj. Amasoj da homoj uzas ilin ĉefe dum la printempa festo, la plej grava fes-



Murego Badalin

to en **Ĉinio**. Kupeo de malmola kuŝvagono, sen pordo, enhavas ses litetojn kun littukoj, kovriloj, kapkuseno kaj unu granda botelon da varma akvo. Varman akvon oni prenas el akvo varmigilo ĉe enirejo de la vagono. Tiu varma akvo esta utila por teo, manĝaĵoj kaj nudeloj senhidratigitaj en plasta bovlo. En mola klaso nur estas kvar litetoj kun pordo, kiu fermas la kupeon. Estas ankaŭ malmolaj pasaĝervagonoj kun sidlokoj sed iom makomfortaj ĉar ili estas plenplenaj. Kelkfoje por mallonga tempo ni veturis per fulmrapida trajno je 320 km/hore. **Ĉangŝa** situas ĉe la plej longa grangrapida ĉina linio **Pekino-Wuhan-Kantono-Shenzen 2 400 km-a**. Trajn bileto de fulmrapida trajno estas trioble pli kosta ol la malmola klaso! Por tiuj kiuj ŝatas vojaĝi per trajno eblas veturi de **Pekino al Moskvo** tra **Mongolio** kaj **Siberio** (7865 km-ojn en 5 tagoj en ĉina trajno) aŭ tra **Mandĉurio** kaj **Siberio** (9025 km-ojn en 6 tagoj en rusa trajno). Poste, de **Moskvo al Parizo** tra **Varsovio** kaj **Berlino** (3 000 km-ojn en 38 horoj en rusa trajno). Mi revas trajveturadi de **Francio** al **Ĉinio**, ĉar ĉiam mi enuas en aviadilo, ĉar oni ne vidas pejzaĝon kaj la vivon de popolo!

## Impresoj

**Ĉinio** estas samtempe antikva kaj moderna lando, hejmeca kaj stranga, tre urba kaj ĉefe kampara, samtempe tradicia kaj noviganta, futurisma kaj malmoderna. . . **Ĉinio** mirigas vojaĝantojn per multaj paradoksaj aferoj. Multaj eblecoj malfermiĝas al ili por viziti ĝin.

**Bruno HENRY**